



Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Ĉasopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 2/2022 (225)

21. 9. 2022

Tridekjariĝo de KAVA-PECH



Foto: Pavla Dvořáková

La 9-an de junio okazis en la sidejo de la Unio de Ĉeĥaj Interpretistoj kaj Tradukistoj granda solenaĵo okaze de la tridekjariĝo de la eldonejo KAVA-PECH, posedata de nia elstara membro Petr Chrdle. Inter multnombra aŭditorio aperis ankaŭ multaj pragaj kaj alilokaj esperantistoj, kiuj venis festi la jubileon kaj gratuli al Petr.

EL LA ENHAVO

Aktualaĵoj	2
Bliži se oslavy 120. výročí	3
KAVA-PECH tridekjara (P. Chrdle)	4
Okaze de la 73-a IFEF-Kongreso	6
Mallonga somera ekskurso (M. Turková)	8
Kiel oni festis pasintajn jubileojn	9
Václav Hollar (M. Turková)	20

O ĉasopisu

Evidenční číslo: MK ČR E22980
Vydavatel: Klub esperantistů v Praze
Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7
Vychází třikrát ročně
Kontakt: t.brichacek@seznam.cz
Redaktor: Tomáš Břicháček
Korektury: Pavol Petřík

Okazintaĵoj

12/05/2022 – diskuto pri la organizado de la festo de la venonta 120-a jubileo de nia klubo, kiu okazos en novembro (*klubejo*)

09/06/2022 – solenaĵo okaze de la 30-a datreveno de la fondiĝo de la eldonejo KAVA-PECH (*Jednota tlumočníků a překladatelů*)

23/06/2022 – prelego de Tomáš Břicháček pri lokoj ligitaj kun la komencoj de Esperanto en Prago (*klubejo*)

15/09/2022 – kuna legado kaj diskuto pri Eduard Weinfurter (*klubejo*)

Helpu helpi 2022

Vlasta Piščíková

La 3-an de aŭgusto 2022 okazis jam la naŭa aranĝo HELPU HELPI, dum kiu esperantistoj de E-mental' aĉetis brikojn por karitata projekto Briko, kiu helpas konstrui labortrejnadcentron por handikapuloj, kiu kreskas rande de Prago.

Estis kolektita mono por 39 brikoj!

La aĉetitaj brikoj estis ornamitaj per Esperanto-tekstoj...

...kaj enmetitaj en simblan muron, kiu staras meze de Prago, en la strato, kie ĉiutage trairas turistoj, kiuj admiras la muron kaj fotas ĝin. Kun la muro ili nun ankaŭ fotas la Esperanto-brikojn, kaj tiel oni povos vidi Esperanton en diversaj mondopartoj.

Grandan dankon al ĉiuj partoprenantoj, kiuj helpis surloke...

...kaj apartan dankon al pragaj, eksterpragaj kaj eksterlandaj bonkoruloj, kiuj denove ne hezitis sendi monon!!!

Virtuala kuro por Paraple

Vlasta Piščíková

En junio okazis unumonata karitata konkurso „Virtuala kuro por Paraple“, kiun ankaŭ partoprenis teamo ESPERANTO. Dum la tuta monato partoprenantoj kuris, biciklis, piediris... diligente registris kilometrojn. Ĉar ili estis tre bravaj, la teamo ESPERANTO atingis la kvaran pozicion! Gratulon al ĉiuj! Dankon al ĉiuj!

Blíží se oslavy 120. výročí založení pražského klubu

Ve dnech 11. až 13. listopadu 2022 bude Klub esperantistů v Praze pořádat oslavy 120. výročí svého založení. Níže naleznete pozvánku s předběžným programem a na stránkách 9 až 19 zařazujeme speciál na téma, jak se slavila kulatá výročí klubu dříve.

Praga Esperanto-klubo
invitas vin partopreni feston
de la 120-a datreveno de la Praga E-klubo

11. - 13. 11. 2022

Atendas vin rakontado pri historio de la klubo, promeno tra gravaj lokoj, kiuj rilatas al la historio de la klubo, projekciado de filmo kun E-subtekstoj, prezentado de libroj kaj eblo aĉeti ilin, kultura vespero...

Partoprenkotizo: 700 Kč
Ĉefa parto de la kotizo kovras sabatan tagmanĝon kaj vespermanĝon, luon de la ejo.

Modesta loĝigo en hostelo en centro de Prago (Spálená strato) en plurlitaj ĉambroj, kun kuirejeto. La ejo ne estas senbariera. La lokoj estas limigitaj. Loĝigo por dunoktoj estas 900 Kč.

Manĝaĵo:
Matenmanĝon prizorgas ĉiu mem.
Partoprenantoj, kiuj havas loĝigon, povas uzi kuirejon ĉe ĉambro.

Vendreda vespermanĝo - restoracio V Podskalí (ĉiu pagas mem)

Sabata tagmanĝo kaj vespermanĝo: restoracio Ad Astra, Podskalská

Dimanĉa tagmanĝo - loko laŭ nombro de interesiĝantoj.

Aliĝilo:





Přihláška / aliĝilo: https://docs.google.com/forms/d/1y4yo-HjVexbbr3S31ux2atoyRN3Z3bp7m0Xa11oky5g/viewform?edit_requested=true

Eldonejo KAVA-PECH tridekjara

Petr Chrdle

Kiam mi fondis etan entreprenon en la jaro 1991, mi neniel intencis fariĝi eldonisto, nek mi intencis agi internacie. Tial ankaŭ la nomo de ĝi estas enigmo kaj mi devas ripete klarigi, ke ĝi estas akronimo en la ĉeĥa kun la signifo Kongresa kaj kleriga agentejo de Petro Chrdle. Do evidentiĝas, ke la ĉefa agado estis organizi kongresojn, seminariojn kaj ceterajn edukajn aranĝojn.

Sed mi sentis, ke pluraj prelegkolektoj estas valoraj, do ili meritis aperi libroforme kun ISBN, por ke ili estu devige registritaj en katalogoj kaj neforĵeteble restu en difinitaj bibliotekoj. Tial mi komencis esplori la eblojn de laŭmenda eldono ĉe eldonejoj kaj presejoj. Sed pro la dezirata eldonkvanto inter 60 kaj 200 ekzempleroj oni aŭ priridis min, aŭ donis al mi tian prezon, ke neniuj aliĝus al la evento pro la aliĝkotizo enhavanta la prelegkolekton.

En tiu situacio mia edzino Stanjo proponis, ke ni registriĝu en la sistemon ISBN kiel eldonejo por ekhavi proprajn ISBN kaj ke ni produktu la librojn „surgene“. Tiel ni registriĝis en la jaro 1992, do nun ni festas la tridekjariĝon de la eldonejo. Ni aĉetis kopiilon (tiutempe analogan), mane regatan tranĉilon por havi belajn eĝojn, kaj grandan pinglilon por nedikaj libroj. La pli dikajn ni igis glui en spine en la malplej kosta maniero.

Klare, se tiam jam ekzistis kvalita cifereca presmaniero, mia eldonejo ne ekestus. Sed kiam ni jam pro neceso fariĝis eldonejo, tiu laboro komencis plaĉi al ni kaj ni komencis eldonadi ankaŭ librojn en Esperanto, nia komuna hobbio, sekve ankaŭ en la ĉeĥa. Kaj iom paradokse nun, kiam mi estas pensiulo, mi nuligis ĉiujn miajn aktivaĵojn krom tiu neintencita, nome eldoni librojn. Ĝi restis mia hobbio ankaŭ post la forpaso de Stanjo.

Ĝis nun mi eldonis kun mia ISBN 235 librojn kaj preskaŭ duono iel tuŝas Esperanton: aŭ ili estas skribitaj en Esperanto (originale aŭ tradukite), aŭ temas pri lernolibroj de Esperanto, vortaroj aŭ tradukoj el Esperanto (tiuj ĉiam kun klara indiko en la kolofono, ke temas pri traduko el Esperanto). Kaj danke al la libroj en Esperanto mia eta eldonejo estas enskribita en la ĉeĥa libro de rekordoj kiel la eldonejo eksportanta proprajn librojn en la plej multajn landojn de la mondo.

Krom tiuj propraj eldonaĵoj ĝi produktas librojn ankaŭ laŭmende kun ISBN de aliaj eldonejoj aŭ individuoj. Mi povas mencii la lastajn tri eldonojn de PIV por SAT aŭ plurajn librojn por FEL, sed ankaŭ por neesperantistaj etaj eldonejoj. Kiel ekzemplon mi indiku la eldonon de la lernolibro de la itala en la sveda. Tamen, se mi ricevas mendon de iu neesperantista kliento, ĉiam estas en la fono iu esperantisto, kiu min rekomendis. Ja apenaŭ iu

kredus al nekonata eksterlanda eldonejo sen bonaj referencoj de iu, al kiu oni fidas.

Mia devizo dekomence estas ĉiam teni profesion kvaliton. Kiam mi ricevas demandon de iu nova kliento, mi neniam strebas doni la plej malmultekostan oferton, sed la plej favoran rilaton inter kvalito kaj prezo.

Dum iu intervjuo por ĉeĥa gazeto mi estis demandata, kiun el miaj eldonaĵoj mi pleje ŝatas. Mi respondis, ke mi ne povas indiki la plej ŝatatan libron, ĉar ĉiu manuskripto kaptis mian atenton, alimaniere mi ne eldonus ĝin. Sed, pli proksimas ĉemizo ol mantelo (laŭvorte el la ĉeĥa), mi do menciis, ke mi plej fieras pri mia Sen laco por paco, pri la vivo kaj verko de praga naskito kaj la unua ina nobelpremiito por paco Bertha von Suttner, eldonitan en Esperanto, kiu havas pozitivan eĥon kaj eĉ bone vendiĝas. Kaj momente al mi kaŭzas ĝojon la eĥo de mia plej freŝa libro *Ĉinio, Koreio, Japanio, la landoj similaj sed diferencaj*, pri tio kiel mi ekkonis ilin dum miaj relative oftaj vizitoj. Ĝin mi eldonis kaj en la ĉeĥa kaj en la Esperanto-versioj.



Fotoj: Pavla Dvořáková



La 9-an de junio mi organizis (kunlabore kun la Unio de Ĉeĥaj Interpretistoj kaj Tradukistoj, kun kiu mi jam multajn jarojn kunlaboras) la solenaĵon omaĝe de la tridekjariĝo de mia eldonejo. Ĉeestis proksimume cent partoprenantoj, inter ili proksimume duono estis esperantistoj, eĉ el Slovakio kaj Germanio. En la ĉeĥa kaj en Esperanto kantis Jolana Haan Smyčková, aktorino kaj kantistino de la plej populara ĉeĥa malgrandforma teatro Semafor, filino de la operkantisto kaj esperantisto Miroslav Smyčka, kiu multfoje koncertis ankaŭ por esperantistoj.

Aperis en la revuo Esperanto, n-ro 1370(7-8), Julio-Aŭgusto 2022

Okaze de la 73-a IFEF-Kongreso (Beroun, 6. 5. – 11. 5.)

Margit Turková



Organizantoj de la kongreso meritas laŭdon, ke ili por sia kongreso elektis tiel taŭgan lokon!

Ĝuste dum la nunaj tagoj estas en la urbo, jes en la tuta regiono, tre solena etoso. Ĉar antaŭ 50 jaroj estis la regiono proklamita **Protokto-teritorio Ĉeĥa karsto** (sub:

CHKO – ĝi disvastiĝas laŭ la rivero Berounka, ĝis Prago). Por ke ni ĝuu la kongreson ne nur ene de salonoj, sed ankaŭ dum la ekskursoj, da kiuj oni abunde proponas, ni jam antaŭe preparu nin por la belaĵoj kaj interesaĵoj.

La Karsto estas regiono de kalkoŝtonaj rokoj, de disvastiĝintaj lumplenaj folioarbaroj, de arbostepoj kaj ŝtonostepoj. La regionaj institucioj preparas multajn entreprenojn, el kiuj ni rimarkigu almenaŭ la eksteran ekspozicion sur la ĉefa urboplaco de Beroun, kaj similan en la Muzeo de la karsto. Ĉiuj trajnovojaĝantoj tuj post foriro el la stacidomo Smíchovské nádraží en Prago b.v. turni vian kapon dekstren supren – kaj vi ekvidos, sur la alta roko, oran skribaĵon „BARRANDE“. Kial ni rememorigas ĝuste tiun ĉi nomon kun nia kongreso en la Beroun-regiono...?

Joachim Barrande (1799 – 1883)

Li studis en Francio en politeknikaj lernejoj kaj samtempe li ĉeestadis natursciencajn prelegojn. Li fariĝis konstruĝeniero, specialiĝis por voj-kaj pont-konstruoj (unu ponto, tra la rivero Loire ekzistas ĝis nun). (Simile studis lia pli juna frato Joseph, kiu poste servis en cara armeo kaj meritas pro konstruoj de la ruslandaj trajnolinioj). Per la fako Joachim vivtenis sin, ankaŭ siajn familianojn.

En la j. 1826 fariĝis Joachim edukinstruisto en la nobel-familio de la Duko Aqoulén (la posta reĝo Karolo X.) por lia nepo Henry.

Post la revolucio (1830) la reĝo kun sia familio, Barrande kune, forlasis Francion; ili trovis rifuĝejon en Edinburgo. Tie Barrande komencis interesiĝi pri paleontologio. Jam en la j. 1832 ili translokiĝis en Ĉeĥion, en Buštěhrad, sed post nelonga tempo, pro epidemio, ili estis akceptitaj en la Praga burgo (Hradčany), la taŭga rezidejo por reĝoj.


Kiam la reĝa familio forlasis Ĉeĥion, Joachim B. translokiĝis en la subburgo-kvartalo, Malostranské náměstí, en la domon „Ĉe tri oraj steloj“. Kiel eminenta intelektulo li baldaŭ troviĝis en scienc-ema societo, kie elstaris la grafo Kašpar Šternberk (instiganto por fondi nacian muzeon), Lin J.B. vizitadis en lia palaco. Tie li renkontiĝadis kun ties arkivo-prizorganto – František Palacký (k.a.).

La grafo Kašpar Štenberk estis tiama prezidanto de la Unua privilegia relo-
asocio kaj dungis J. B. kiel unuan inĝenieron por la konstruo de la trajno-
linio Praha – Beroun – Plzeň. En la rokoj, kiuj devis esti forigitaj,
montriĝis prehistoria estinto de la regiono, ĉar en paleozoiko tie ĉi
disvastiĝis malprofunda maro. (La menciita roko „Barrande“ estas la unua
elstarajo de la Karsto, flanke de Prago). Ĉe la rekognizado (mapado) de la
regiono malkovriĝis antaŭ la inĝeniero granda trovaĵejo de ŝtoniĝintaj
fosilioj, precipe trilobuloj (trilobitoj). Tiam plene eruptis lia pasio por
paleontologio, de tia tempo la nomo Joachim Barrande estas en la tuta
mondo ligita kun la nocio „ĉeĥaj trilobitoj“.

Antaŭ sia foriro el Ĉeĥio (li mortis an Aŭstrio) li siajn riĉajn
paleontologiajn kolektojn donacis al la ĉeĥa sciencaro, kaj tiu, dankema,
nomis la karstan kreston ĉe Prago „Barrandien“ kaj vidigis tion per la ora
skribo sur la menciita roko.

Pri Joachim Barrande ni havas ankoraŭ jenan intiman rememoron: kiel jam
dirite, li loĝis en la domo „Ĉe tri oraj steloj“, kie la mastrumadon prizorgis
Barbara Nerudová – la patrino de Jan Neruda. Barrande eklernis ĉeĥan
lingvon, tial li povis tralegi la unuajn verkojn, kiujn al li proponis la fiera
patrino de la poeto. Sed la atendita laŭdo ne alvenis. La pragmatika
sciencisto esprimiĝis jene: „*Sciu – skribi poemojn estas nenio por vi... se
vi volas vere esti al via popolo utila, forlasu la poezion kaj okupiĝu pri
scienco...*“

Jan Neruda „la poezion ne forlasis“, kaj la motivo de olda sinjoro, kiu
kolektas ŝtonojn, troviĝis en la aŭtora libro „Malostranské povídky“
(1876).



Joachim Barrande

Mallonga somera ekskurso Sed tre emocia

Margit Turková



En Lipnice nad Sázavou

Plensentimente de ĉeĥoj nomata „Haškova Lipnice“ – ĉar oni scias, ke la urbeto fariĝis hejmo por la verkisto Jaroslav Hašek en liaj lastaj vivojaroj. En la loko troviĝas kelkaj (la plej gravaj) memorindaĵoj pri la aŭtoro de la romano *ŠVEJK*... En la j. 2013 ni rememoris 90 jarojn ekde lia morto. Kun amaso da homoj ni, esperantistoj, partoprenis senvualigon de la Memor-monumento omaĝe al la verkisto; laŭprave tial, ke ankaŭ ni dediĉis certan monsumon por ĝia realigo. Komence de ĉijara septembro mi vizitis la Monumenton,

kaj konstatis, ke inter la donacintoj estas sur la unua vico videbla: Český esperantský svaz...

Číhošť

Oni povas konstati, ke la vilaĝo Číhošť estas same fama kiel la supre menciita urbeto Lipnice; se ne eĉ pli!...

Ni vizitis la preĝejon, kie en la j. 1949 okazis t.n. „Číhošťský zázrak“ (*rim. la mistera religia evento*) kaj la paroĥ-domon, kie loĝis la sacerdoto **Josef Toufar**. Ni estis dankplenaj al la vilaĝanoj, kiuj prizorgis la dignan memoron je la grandanima kaj grandkora Homo, kiu estiĝis la plej bedaŭr-fama viktimo de komunisma persekutado. En la domo troviĝas arkivaj memorindaĵoj, dokumentoj, eĉ urno kun la humo el tombejo de Josef Toufar.

Sed kio estis surprizo por ni: oni vidas sur la foto, ke en la vilaĝo troviĝas „**Střed Čech**“ – do fakte la geografia koro de la ĉeĥa lando. Pri la monumento oni estas dankemaj al la loĝantoj de la vilaĝo – precipe al la „fajrobrigado“ (ĝenerale tiu ĉi organizo estas ĉie la plej vigla, ĉu).

Fine mi diras la plej „kliŝan“ frazon: ke nia lando estas plena de belaj – ĉu naturaj, ĉu memor-koncernaj. Ni vizitadu ilin!

Kiel oni festis pasintajn jubileojn

La Esperantista klubo en Prago prepariĝas por la venonta 120-a datreveno de sia fondiĝo. Indas do serĉi en la arĥivaĵoj kaj ekscii, kiel festis nia klubo siajn grandajn jubileojn en la pasinteco.

Jen kelkaj dokumentoj (tondaĵoj), kiuj koncernas la jarojn 1922, 1947, 1952, 1972, 1982, 1992, 2002 kaj 2012.

1922 (la 20-a datreveno)

✂ La ĉefa esperantista societo ĉeĥoslovaka „Esperantista Klubo en Praha“ festis sian 20jaran daŭron la 10. dec. t. j. [...]

Dudek jarojn! Ĉu oni prezentis al si kiom da senprofita laboro kaj da senlaca propagando faris dum tiu tempo la fondintoj de la ĉeĥa movado: fratoj Kühnl, d-ro Kamaryt, geedzoj Kraus, moraviaj herooj instr. Čejka kaj Krompholc kaj kelkaj aliaj, kiuj ankoraŭ nun estas same sindonaj pioniroj de Esp., kiel antaŭ dudek jaroj? Festante la jubileon de Esp. Klubo de Praha ni devas memori ankaŭ ĉi tiujn verajn heroojn de nia movado kun dankemo kaj admiro de ilia laboro. Ĉu la granda vico de niaj nuntempaj propagandistoj restos fidela al nia movado dum du jardekoj?

Je la deka matene, la 10. dec., malfermis la festan ĝeneralan kunvenon de la Klubo (en la halo de d-ro Grégr en la Reprezenta domo de Praha) ĝia nuna tre simpatia prezidanto prof. J. Eiselt, menciante la signifon de la jubileo. Precizan kaj interesan historion de la Klubo prezentis s-o kons. K. Procházka, aludante ankaŭ la iaman, danke al dio jam forpasintan malakordon inter la membraro de la Klubo.

Pri la nuna situacio de esp. movado, tiom diferenciĝanta de la stato antaŭ dudek jaroj, parolis la ĝen. sekret. de ĈAE. s-o R. Hromada. La estontecon de Esp. hele kaj interese skizis prof. Kamarýt. Per li estis elĉerpita la vico de oficialaj oratoroj kaj nun la reprezentantoj de diversaj korporacioj povis prezenti siajn alparolojn. Ili estis: Mírová společnost Chelčický (Porpaca asocio Ĥelĉický), „Verda Stelo” la societo de germ. esp. en Praha; pri la signifo de Esp. en la propagando de naciaj penadoj parolis la ĉefkom. de Komerca min. s-o A. Pitlik. Salutleterojn sendis: Administra komisiono de Praha kaj Esp. soc. el Nymburk. Telegramojn: Sekcio de Germ. ligo esp. en Liberec, Esp. soc. „D-ro Schulhof“ en. Pardubice. Siajn ofic. reprezentantojn sendis: Sinjorina esp. Rondeto en Praha, Esp. societo en Jiĉin, Esp. klubo kaj la Popola universitato de Plzeň, Esp. soc. de Hradec Kral., Societo de nevidantaj esperantistoj en Praha (jen prof. Stejskal prezentis historion de Esp. inter blinduloj).

Fine estis akceptita rezolucio akcentanta ĝeneralan intereson de la publiko pri la internacia lingvo, dume la oficialaj rondoj malatentas la gravecon de

Esp. Tial oni akcentis la neceson, ke la ŝtataj oficoj atentu Esp. laŭ la valoro, kiun ĝi havas por sukcesa propagando de ĉs. aferoj kulturaj. Vespere estis aranĝita „akademio“ en la halo de Sladkovský en la Reprezenta domo kun tre riĉa programo. Enirante en la trian jardekon de nia movado ni faru la promeson, ke ni ne forlasos Esperanton antaŭ ĝia fina venko! Per komunaj fortoj ni venkos!

La Progreso, n-ro 10, decembro 1922

1947 (la 45-a datreveno)

1947-11-22 je la 20-a horo en granda salonego de Virina Klubo Ve Smečkách 26 - Solena vespero kun arta programo honore al la 60 jaroj de Esperanto kaj 45 jaroj de la klubo

La kroniko de Jiří Patera

1952 (la 50-a datreveno)

1952-12-13 okaze de la 50-jara jubileo de la klubo okazis solena vespero en la halo de Virina Klubo Ve Smečkách kun arta programo kaj muziko. Okaze de la naskiĝo de D-ro Zamenhof oni prezentis unuaktan teatraĵon speciale verkitan por tiu vespero de J. Baghy.

La kroniko de Jiří Patera

1972 (la 70-a datreveno)

✂ Sepdekjara jubileanto

Preskaŭ tri generaciojn aĝa Esperantista Klubo en la ĉefurbo Praha ĝisvivis la pluan rondciferan viv-jubileon; la sepdekjariĝon de tiu ĉi plej granda societo esperantista en Ĉeĥoslovakio rememoris la 25-an de novembro pli ol tricent esperantistoj inkluzive de eksterlandaj gastoj el Germana Demokratia Respubliko kaj Svedio. La solenaĵo sub la devizo „70 jaroj de Esperantista Klubo en Praha – 70 jaroj de Neumann-eca tradicio“ okazis en la kulturdomo „Gong“, Praha-Vysočany.

Post inaŭguraj vortoj de la kluba prezidanto Josef Drlík salutis la ĉeestantojn reprezentantino de Distrikta Komitato de KPĈ Praha 9, Marie Vodičková. Montrinte sian sinceran admiron por la esprimeblecoj de la Internacia Lingvo, tiu „latino de proletaro“, kiel ŝi diris, ŝi akcentis, ke nia socio kalkulas je la helpo de la esperantistoj, kiuj supozeble altigados siajn fakajn konojn precipe kiel progresemaj popolanoj de la socialisma ŝtato.

La poemon de Stanislav Kostka Neumann „Printempa anonciacio“ en la traduko de Jiří Kořínek prezentis Olga Šádková.

La ĉefparoladon liveris Josef Víték, la prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Li rememoris la kunfondinton kaj komitatanon de Esperantista Klubo en Praha, gloran revolucionan poeton Stanislav Kostka Neumann, kies personeco sendube pioniris ĉe la unuaj paŝoj de la klubo [...].

Sed ne nur al pasinteco reiris liaj vortoj. Ili turnis la atenton de la publiko al la aktualaj problemoj de multlingveco. Tiu ĉi kolosa ŝargó de la moderna homaro surpronis diversajn aspektojn: ekonomian, politikan, psikologian. Kun la daŭre kreskantaj internaciaj rilatoj la bezono de unu neŭtrala komuna komprenilo estas ĉiam pli kaj pli sentebla. Helpi la solvon de la monda lingvoproblemo estas la precipa tasko de la Esperantomovado.

En la kultura parto de la festo oni spektis kelke da aranĝoj. Sian poemon „Homoj“ deklamis konata Esperanta poetino Eli Urbanová. Pri la kontribuo de Esperanto al la ĉeĥa nacia kulturo parolis d-ro Vlastimil Novobilský CSc.

Muzike rolis d-ro Pravoslav Šádlo, violonĉelisto, plue Miroslav Smyčka, membro de la Operdomo en Ústí n. Labem kun pianakompano fare de la konservatoria profesorino L. Šimková kaj de la ĉefa muzik-direktanto de la Muzikteatro M. Homolka.

„Mesaĝon de la infanoj“, kiun por tiu ĉi okazo verkis D-ro Pumpr, kun unika ĉarmo kaj en perfekta Esperanto prezentis 25-membra kolektivo de etaj lernejoj kun sia instruistino M. Juřenová. Bedaŭrinde la aŭtoro ne povis jam vidi tiun ĉi prezentadon.

La amatora folkloro trupo PAL el Praha-Kbely sub la gvido de V. Šolc ravis per siaj popolaj dancoj, kantoj kaj muziko.




Etaj lernejoj
sub la gvido de
M. Juřenová pre-
zentis "Mesaĝon
de la infanoj".

Gratulletero de d-ro Ivo Lapenna

La prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio, prof. d-ro Ivo Lapenna, sendis okaze de la jubileo gratulleteron al EKP, en kiu li skribas interalie: „Mi ĉiam rememoras kun kortuŝo kaj simpatio la grandan kunvenon, en plenŝtopita salonego, kiam vi kolektiĝis okaze de mia prelego antaŭ kelkaj jaroj... Inter la lokaj Esperanto-societoj via Klubo ĉiam ludis aparte elstaran rolon kaj mi deziras gratuli al la Klubo kaj al ĉiuj ĝiaj membroj en la nomo de UEA kaj en mia propra la jubilean datrevenon. Tiuj gratuloj rilatas ankaŭ al la tuta laboro de via Klubo dum plenaj 70 jaroj, kaj ili inkluzivas bondezirojn por same brila agado ankaŭ en la estonteco.“

[*Starto, n-ro 8/1972*](#)



[*Bulteno, n-ro 4/1972*](#) – jubilea bildo en la ĉefa paĝo

Diamanta jubileo

Ladislav Kynčl

En la tagĵurnalo trovis
komunikon la leganto:
ke estiĝis nova lingvo
de Doktoro Esperanto.
La studentoj scivolemaj
tiun lingvon tuj eklernis
kaj por nobla nova sento
siajn korojn ekmalfermis.

En la jar' mil naŭcent dua:
plia komuniko grava,
ke ĵus estis establita
Esperanto-klub' en Praha.
Oni verkis lernolibrojn,
eĉ gazetoj jam aperis
kaj insignon de l'espero
oni portis kaj fieris.

La popol' de Praha tiam
indiferenta ne ŝajnis,
baldaŭ en la klubo vere
novaj membroj svarmis.
Kaj prosperis la movado,
ja estiĝis eĉ elito. . .
Sed haltigis la progreson
la unua mondmilito.

Tiuj tagoj malfeliĉaj
plian malĝojigon portis
por la anoj de la lingvo:
Zamenhof, la majstro, mortis.
Tamen lia verko restis,
ne perfidis la anaro
kaj memoron lian festis
laŭ la dat' de l' kalendaro.

Fine ĉesis la milito.
Nia klub' denove vivis,
eĉ progresis per sukcesoj
kaj disfloris kaj aktivis.
Antaŭ Praga Mondkongreso
la preparlaboroj hastis
kaj en Praha ĉe klubanoj
miloj da amikoj gastis.

Dudek jarojn regis paco,
kiun la homar' deziris.
Ni en kluba atmosfero
ĝoje kaj libere spiris.
Ĉe dimanĉaj ekskursadoj
Esperanto ankaŭ sonis,
librojn, kursojn kaj amuzon
nia vigla klubo donis.

La kvardekon de la klubo
ĝoje festi ni ne povis. . .
Super ni jam staris nuboj,
de Okcidento vento blovis.
La Gestapo malpermesis
al la klubo la agadon,
la bibliotekon donis
al detruo kaj rabado.

Sed eĉ tiu nuboj pasis
kaj en foro malaperis.
Tiam ankaŭ nia klubo
releviĝis kaj ekspiris.
Kaj denove ĉe l'komenco
oni en malpleno staris:
perdojn, vundojn kaj viktimojn,
post milito inventaris.

Post nelonga tempospaco
repleniĝis niaj vicoj
per adeptoj esperantaj,
veteranoj kaj novicoj.
La sesdeka jubileo
estis plena de sereno:
sonis muziko kaj kanto,
festparolo kaj poemo.

Kaj ĉijare nia klubo
jam sepdekon ĝoje festos.
Vi, fidelaj klubo-membroj
certe ĉe l'soleno estos.
Oni kantos la Esperon,
oni hisos verdan flagon.
Venu, venu en la klubon,
ĝi etendas siajn brakojn.

[Bulteno, n-ro 4/1972](#)

1982 (la 80-a datreveno)

1982-10-23 okazis solena kunveno okaze de la 80-a datreveno de la Klubo en la kulturdomo Gong, en Praha 9, Sokolovská str., kun posttagmeza kultura programo (prof. Sádlo, E-trio, s-ano Deke el GDR, M. Smyčka, Spořilov-kvarteto, infanĥoro).

La kroniko de Jiří Patera

✂ Solenaĵoj de la 80-jariĝo de la Esperantista Klubo en Praha

La solena renkontiĝo de esperantistoj en Praha okaze de la 80-a datreveno de fondiĝo de Esperantista Klubo en Praha okazos en Kulturdomo GONG en Praha 9, Sokolovska strato 969. La renkontiĝo okazos sabate la 23-an de oktobro 1982 kaj dimanĉe la 24-an de oktobro 1982 kun jena programo: sabate la 23-an de oktobro:

10.00 – 12.00 solena kunveno

14.00 – 17.00 kultura programo, en kiu prezentos sin prof. Sadlo, E-trio (Eva Seemannová kaj geedzoj Budinský), s-ano Deke el GDR, s-ano Smyčka, Spořilov – kvarteto kaj infan-ĥoro

19.30 – 23.00 vespero kun muziko kaj danco, dum kiu prezentos sin la esperantista grupo Barbuloj,
dimanĉe la 24-an de oktobro:

9.30 – 12.00 h ekskursoj tra Praha laŭ via elekto.

[...]

La okdekjariĝo de la Esperantista Klubo en Praha estas grava jubileo ne nur de la praga esperantistaro, sed sendube de la tuta ĉeĥa kaj ĉeĥoslovaka Esperanto-movadoj. Kiel la historio de la ĉefurbo Praha egalas samtempe al la historio de la tuta ĉeĥa nacio, same ankaŭ la historio de la Esperantista

Klubo en Praha estas kvazaŭ koncentrita historio de la tuta nialanda movado.

Kompreneble Praha ne estas kaj neniam estis la sola fokuso de nia movado – la unua ĉefa lernolibro de Esperanto aperis en Pardubice, la dua en Bystřice pod Hostýnem, la unuaj kluboj en nia lando estis en Příbor kaj Brno ktp. – tamen eblas diri sen troigo, ke la Esperantista Klubo en Praha ĉiam apartenis al la ĉefaj kolonoj de la Esperanto-movado en nia lando.

Ju pli forta kaj agema estis la klubo, des pli forta kaj vivoplena estis la tuta movado, kaj male la periodoj de malprogreso kaj stagnado de la klubo estis samtempe malfavoraj ankaŭ por la tuta movado. Tio estas tute natura kaj komprenebla fenomeno: ju pli grandaj kaj fortaj estas la unuopaj kluboj kaj grupoj en la tuta lando, des pli granda kaj forta estas la landa movado kaj ĝia tutlanda asocio. Pro tio la ĉefa tasko kaj devo de ĉiu praga esperantisto estas subteni la klubon kaj aktive partopreni en ĝiaj laboroj. Sole tiamaniere oni povas subteni la tutlandan movadon kaj samtempe la movadon tutmondan. Sidi hejme kaj neglekti la klubon ne estas la ĝusta vojo! Unu el la plej oftaj motivoj de nepartopreno en la kluba vivo estas la netaŭgeco kaj malproksimeco de la klubejo. Sed ankaŭ tiu ĉi malfavora fakto povus ŝanĝiĝi, se la klubo estus pli granda kaj forta. La klubo nun ricevis de la Nacia Komitato plian ĉambron, malgrandan por klubkunvenoj, sed sufiĉan por kursoj, komitatkunvenoj, junulara sekcio



PRAHA ✕ Dum la festeno okaze de 80-jara jubileo de la Esperantista klubo Praha, kiun vizitis multaj personoj, estis ankaŭ riĉa elekto de la E-libroj kaj ĵurnaloj en improvizita vendejo. Sur la bildo /de dekstre/ s-aninoj Šperlingová, Vojtová kaj Křenková dum la vendado.

ktp. La ejo situas en la centro de la urbo, proksime al la asocia oficejo. Sed povas esti, ke la klubo baldaŭ havos alian ĉambron, pli grandan kaj konvenan por sia agado. Tiam ĝi bezonos kunlaboron de ĉiuj siaj membroj kaj ankaŭ de aliaj esperantistoj, kiuj ĝis nun ne fariĝis membroj de la klubo. Ni ĉiuj kunagu por tio, ke en la novan jardekon de sia ekzisto ekpaŝu la Esperantista Klubo en Praha kun novaj fortoj kaj entuziasmo.

[Bulteno, n-ro 9/1982](#)

☞ fotoĵo el [Starto, n-ro 6/1982](#)

1992 (la 90-a datreveno)

1992-11-6/8 la solenaĵojn de 90-a jariĝo de nia klubo ĉeestis cento da gesamideanoj en la restoracio Na Zvonařce

1992-11-08 la Ĉs. televido elsendis popularan amuzan konkursprogramon Videostop kun ĉeesto de esperantistoj (ĉeestis 43 ges-anoj, la programgvidanto J. Rosák diris, ke lia edzino lernis Esperanton - konkursis D. Kočvara, M. Severa kaj K. Hubnová, kiu venkis kaj instigis J. Rosák lasis sin foti kun ŝi)

Kroniko de Jiří Patera



✂ Devadesát let Klubu esperantistů v Praze

V roce 1901 se v Brně utvořil První spolek rakouských esperantistů (jako první spolek esperantistů na území dnešního Československa), který chtěl sdružovat všechny rakouské nebo aspoň české esperantisty, ale hned v roce 1902 se osamostatnil pražský klub, a tak pražští esperantisté

oslavovali letos 90. výročí vzniku svého klubu. V klubovně ve Vejvodově ulici na Starém Městě si členové i hosté poseděli v pátek, avšak skutečné oslavy vypukly až v sobotu v restauraci na Zvonařce, se slavnostní schůzí, kulturním programem i taneční zábavou a tombolou. O výročí informoval páteční Večerník Praha a úspěšný víkend korunovala populární televizní soutěž Videostop. Ta byla přímým přenosem odvysílána v neděli 8. 11. 1992 na programu F1 ve 20.30 h. Avšak za zaznamenání nestojí jen to, že to byla soutěž napínavá, která přinesla vedle napětí i humor a dobrou pohodu, ale zvláště fakt, že v jejím úvodu se hovořilo o esperantu, a to když se představovali soutěžící: Drahomír Kočvara z Ostravy, Miroslav Severa z České Lípy a Květa Hubnová z Prahy. Soutěže se zúčastnily populární osobnosti: Jiří Bartoška, Karel Čáslavský, Lubomír Lipský, Jan Rosák, Ladislav Rychman, Pavel Zedníček.

Nezbývá než dodat, že v roli diváků přihlíželo ve studiu 40 esperantistů z celé ČSFR a že vítěznou dvojicí se stali Květa Hubnová a Lubomír Lipský. [...]

[Starto, n-ro 6/1992](#)

Esperantskému klubu k jeho výročí 1992

Jiří Karen

Pražskému klubu bude záhy 100 let.
Kdekdo po historii se rozhlíží.
Esperanto? Něco jako samolet.
Jo, to bychom měli
být Praha v Paříži.

Náš klub by si vylezl na Eifelovku,
prošel by vítězně obloukem.
Do Čech bychom jeli, platili zde frankem.
Za deset haléřů bychom koupili, co my teď za stovku.

Kdyby náš klub byl v Londýně, na Picadilly,
kde je tolik atentátů, padají tam pumy.
Můžeme se zaručit, že nespádnou na toho,
kdo esperanto umí.
Cizinec si libuje. Delegát UEA je tam milý.

Kdyby náš klub byl v Berlíně nebo Bonnu,
vybrali bychom při sbírce pět milionů,
do Prahy esperantistům bychom poslali
tisíc bonů,
aby za něco stál náš dárek.

A kdyby náš klub byl v Římě, přímo ve Vatikánu,
za člena bychom jistě získali papeže,
v esperantu bychom sloužili mše,
což jistě by se líbilo nejvyššímu pánu.

A být náš klub ve Vídni,
chodili bychom tam knihy číst do Kaiserhofu,
až by vrátný viděl hvězdu na klopě, byl by vlídný
a já bych si jistě vyšetřil čas na strofu.

Kdyby náš klub byl někde v Africe,
konali bychom vycházky, navštěvovali opice,
zebry bychom zagitovali, ba i slony,
záhy by nás byly statisíce a miliony.

Být náš klub v Pekingu, ve staroslavné Číně,
tam by nebylo krokodýlů, tam nikdo nestuduje líně,
cestovali bychom po čínské zdi bez jízdního řádu.
Pražský klube, žij a vzkvétej.
Ke Tvému pomníku věnec s trny kladu.

Jiří Karen
kun
deziro,
ke al nia klubo
aliĝu
reĝo riĉa aŭ veziro.

[Bulteno, n-ro 1/1993](#)

2002 (la 100-a datreveno)

✂ [La] ĉefa aranĝo de la jaro 2002 estis la Solenaĵo de la Centjariĝo de nia klubo kaj la jubilea 10-a Kongreso de ĈEA, kiuj okazis de la 15-a ĝis la 17-a de novembro 2002 en la kulturcentro Zahrada en la praga kvartalo Chodov.

Jam unu semajnon antaŭ la solenaĵoj estis tie inaŭgurita ekspozicio pri Esperanto, kiun sukcese aranĝis s-ano Zdeněk Heiser. Ĉefloke de la ekspozicio estis instalita la jam historia busto de L. L. Zamenhof, farita de ĉeĥa skulptisto Emanuel Kodet por la 13-a UK en la jaro 1921; la busto estis prunteprenita el la Esperanto-muzeo en Česká Třebová. La ekspozicio estis publike alirebla ĝis la 22-a de novembro.

Okaze de la centjariĝo de la klubo estis eldonita broŝuro „Centjariĝo de la Esperantista Klubo en Praha“ – nekompleta kompilaĵo de la Esperantaj eventoj en Prago dum cent jaroj. Plue aperis nova poemaro de Zdenka Bergrová „Vortoj de la Nokto“ kaj poemaro de Jiří Karen „Mondo afabla ne nur al vortoj“ – ambaŭ tradukitaj de Jaroslav Mráz.

Salutmesaĝoj al la klubo venis i. a. de la Bolonja Esperanto Grupo „Achille Tellini 1912“ el Italio, de Societo por la Internacia Lingvo Esperanto en Brno k. a.

La solenan kulturan vesperon vendrede la 15-an de novembro enkondukis kaj vorte akompanis Lucie Karešová. En la unua parto de la vespero la rusa pianistino kaj komponistino Jelena Puchova, loĝanta en Prago, prezentis kantojn de M. Bronŝtejn kaj kun infana ĥoro „Opera Praha“ kaj kun Miroslav Smyčka ŝi prezentis kantojn el sia muzikalo „La Eta Princo“ kun vortoj de M. Bronŝtejn. En la dua parto de la vespero Jelena Puchova plane akompanis la operkantistojn Kateřina Kudlíková, Miroslav Smyčka kaj

Josef Vich, kiuj prezentis pecojn el operoj, operetoj kaj ankaŭ popolajn kantojn.

Sabate okazis la jubilea 10-a kongreso de ĈEA, dum kiu estis elektita nova komitato de ĈEA, fruntloke kun la prezidantino Věra Podhradská. En la nova komitato estas ankaŭ pragaj geesperantistoj Lucie Karešová kaj Petr Chrdle (vicprezidantoj), Jindřich Ondráček (kasisto) kaj Jiří Souček (membro de kontrolgrupo). Estis ankaŭ proklamitaj novaj honoraj membroj de ĈEA, inter ili ankaŭ la prezidanto de la Esperantista Klubo en Praha Jiří Patera; tio estas granda honoro ne nur por li, sed precipe por la tuta klubo okaze de ĝia centjariĝo.

Post vespermanĝo okazis dancvespero, kiun komencis la Grupo de akrobata rokenrolo de Sokol Kampa Praha, gvidata de Miroslava Kuchtová, sekvis muzikista duopo el Dobřichovice, poste s-anino Pavla Zemanová kun sia hundineto Dája prezentis dancon el la irlanda muzikalo „La sinjoro de danco“ de Michael Flatley kaj fine jam sekvis la ĝenerala dancado kaj tombolo.

(jpa)

[*Bulteno, n-ro 1/2003*](#)

2012 (la 110-a datreveno)

✂ Nia solena kunveno la 8-an de novembro 2012 estis tre modesta, tute nekomparebla kun la granda solenaĵo pasintjara okaze de 110 jaroj de la klubo en Brno. Nia kunveno okazis labortage, ĉeestis ĝin dek personoj, el ili du gastoj el Benešov.

Komence mi tralegis salutleteron de Pavla Dvořáková, asocia komitatanino, poste artikolon de František Barth, kiu apartenis al la organizantoj de la fonda kunveno de nia klubo en la jaro 1902 kaj kiu fariĝis la unua kluba sekretario. [...]

Post la historia rememoro de Fr. Barth s-anino Margit Turková ripetis sian prelegon pri Karel Havlíček Borovský; tiun prelegon ŝi jam prezentis en Břeclav. Sekvis diskuto, i. a. la kluba prezidanto Ing. Trojan denove rakontis iom pri la UK en Hanojo. Kiel sola ĉeĥo en tiu kongreso li salutis la UK en la nomo de ĈEA kaj ankaŭ en la nomo de nia klubo.

(jpa)

[*Starto, n-ro 4/2012*](#)

Václav Hollar (Wenceslaus Hollar Bohemus)

Margit Turková

„Se ne ekzistus Hollar, ni ne konus London-on...

Ĉu tiun troig-eldiron iu leganto povas toleri - estas la demando...

Sed la brita fakulo tuj daŭrigas: ... „Ni sciis preskaŭ nenion pri la aspekto de Londono antaŭ la granda incendio en la j. 1666, se ĝin ne bildigus Wenceslaus Hollar. La t.n. „La Longa panoramo de Londono“ estas nekredeble detala.

Václav Hollar (alterne Wínceslaus) (1607–1677) naskiĝis sur la sojlo de turbulenta tempo, kiu en fajro kaj fulmo de la tridek-jara milito ekskuegis ĉiujn spiritajn kaj moralajn sekurecojn.

Václav naskiĝis en Prago, kies artplenan medion instigis kaj forte influadis la imperiestro Rudolf II. (alterne Rudolfo la Dua). La kunvortaĵo „rudolfinská Praha“ – la Prago de Rudolfo – estas ja fenomeno en la mondo nepreterlasebla kaj la beataj spuroj de tia tempo estas la fundamento de Prago kiel „baroka urbo“.

Ni ne okupiĝas pri la familio Hollar, nur tion ni menciuj, ke la patro de Václav, kvankam neniu gravulo, fariĝis tamen „persono grava“ – respondeca oficisto en la kabineto de Lando-posedaĵo-registrado (Zemské desky), rekte en la Burgo Hradčany.

Do, oni povas diri, ke en la vejnoj de Václav fluis „baroka sango“, kiu formis lian personecon. Dank’al sia patro li havis en la Burgo eblon estadi en atelieroj de la plej famaj majstroj, kiujn mem la Imperiestro allogis en la landon kaj kiuj precipe lokiĝis en la urbo kaj en la burgo-kvartalo Hradčany.

La 20-jaraĝa Václav, jam matura artisto, foriras el Prago kun amaso da ĉeĥaj (bohemiaj kaj moraviaj) protestantismuloj, ekzilantoj, post la milita katastrofo sur la Blanka Monto...

Surprize, ke lin ne allogis la „lando de baroko“ – do Italio, sed li aldirektis en la germanan urbon Frankfurto ĉe Majno, kie li enlerniĝis en gravur-faka ateliero de la fama majstro Matthaus Merian.

Lian pluan vivosorton influis konatiĝo kun la angla noblulo Thomas Howard, grafo Arundel, kiu tiam vojaĝis tra Eŭropo kiel ambasadoro de la angla reĝo.

Hollar al li ofertis siajn servojn kaj ekde tiam li jam dokumentis lian tutan misian vojaĝon (perbilde, desegnomaniere).

En la j. 1636 li forveturis en Anglion, kie li lokiĝis por ĉiam. Li fariĝis arĥivisto de artkolektaĵoj de sia mecenato Arundel. Li fiksas sian vivon en Londono. Li havis monon, edziĝis, naskiĝis unu filino kaj unu filo. Komenciĝis la plej fruktodona periodo de lia vivo.

Sed poste en Anglio ekestis la konataj tempoj de konfliktoj, kiuj gvidis al la Civitana milito. Hollar forveturis en Nederlandojn kun la grafo, ankaŭ kun siaj familianoj. Kiam li en la j. 1652 revenis en Anglion, la „feliĉo turnis al li dorson“...

Mortis lia edzino, kaj pro nigra pesto ankaŭ lia filo. Kiel bildartisto li estis plu alte pritaksata – sed ne monokoncerne! La ekzekuto de la reĝo Charles I (en la j. 1649) estis ankaŭ fino de la reĝa favoro al Václav Hollar. La nova reĝo – filo de la antaŭa – Charles II pli interesiĝis pri siaj metresoj (eksteredziĝ-amatinoj), ol pri bonfarto de la artisto. (Rim.: despli frapa ironio, ke V. H. estis desegnoinstruisto de la infanjuna princo.) Do, Václav jam ne estis favorato de la reĝa korto, nun li vivtenis sin precipe kiel ilustristo por eldonejoj.

Ne pro aventuremo, sed pro malfacilaj vivkondiĉoj, jam estinte 62-jaraĝa, Václav Hollar viciĝis al la ekspedicio en Afrikon, kiun entreprenis la nepo de lia iama mecenato, ankaŭ la grafo Howard Arundel, kaj kion Václav same abunde kaj precize dokumentis. Gravaj estas liaj grandlarĝaj desegnaĵ-verkoj de la maroka urbo Tanger, precipe de ties citadelo.

Václav Hollar mortis en Londono, en la j. 1677, preskaŭ forlasita kaj preskaŭ forgesita...

Nun ni menciui la bone konatan leĝon: „Tion, kion la historio malnova kaŝforĝegas, la nova malkaŝas.“ Same okazis ankaŭ rilate al nia Václav Hollar. Apud la desegnaĵoj de Leonardo da Vinci estas la plej valora artjuvelaro de la reĝino Elizabeto II ĝuste la desegnaĵoj de Wenceslaus Hollar Bohemus (deponitaj en la burgo Windsor). Kvankam ili estas tre delikataj artefaktoj, kiuj „timas la lumon“, la Reĝino tamen kelkajn pruntis por la retrospektiva ekspozicio, kiu okazis en Prago, en la jj. 2019–2020.

Nun, kiam ni priskribis (nur enkadre) la biografion de la bildverkisto Václav Hollar, ni transiru al kelkaj, almenaŭ al la plej frapaj verkoj de li.

(Rim.: Ni nomas ĉiujn „desegnoj“, kvankam multaj estis fine refaritaj en aliaj grafikaj teknikoj, precipe gravuraj).

Certe la plej fama estas verko „Dobrá kočka, která nemlsá“ (*Bona estas nefrandema kato*). Ne atendu la klarigon de tiom neordinara titolo; ĝis nun neniu en la art-mondo malkovris la enigmon. (Denature ĉiu kato estas „frandema“, ĉu...) Oni povas supozi, ke tio estas lia rememoraĵo al la junaĝo en Prago (kiu tiam abundis je ratoj kaj certe je katoj).

Ĝi ja estas „la plej fama“, sed certe ne unusola tiaspeca objekto de la artisto.

La Nacia Galerio Praha listigas en sia deponejo Hollareum ĉirkaŭ 5500 desegnaĵojn, kaj inter ili videblas, ke V. H. ŝatis ĉiujn objektojn vilajn („harozajn“), kaj tiujn li precipe prilaboradis. La „kato“ ne estas unusola besteto, estas eĉ „bestoj-bestegoj“ – li kiel la unua dokumentis por

eŭropanoj elefantojn (en cirko); troviĝas teneraj estaĵoj kiel papilioj, fiŝoj, ostroj, abundas floroj kaj fruktoj.

Kio estas afero unika – estas la „katalogo“ de kostumoj, kiuj speguligas la modon en Londono, en Amsterdamo, en Prago (Rim.: mi kuraĝas diri, ke la pragaj urbaninoj ne estis la plej elegantaj! M.T.).

Ĉe la vestaĵoj por la vintro-sezono oni povas admiri kaj ĝui ĝuste la bele prilaboritajn peltojn (duonmanteloj, pelerinoj, mufoj). Ĉe la kostumoj por varmaj sezonoj nin allogas la flandraj puntaĵoj, kiuj ornamis kaj virinajn kaj virajn vestojn. Sed nia koro „degelas“, se ni alrigardas abundajn bukedojn da floroj. Plej ofte estis bildigitaj tulipoj, tiam valora raraĵo, kies bulbetoj estis „pagitaj per oro-mono.“ (Rim.: Devene de sub-altajaj ebenaĵoj, tra Turkolando kaj Persio ili alvenis al la Neder-landoj).

Václav Hollar elkreis kelkajn vedutojn de Prago, inkluzive larĝajn panoramojn, kaptitajn de la dekliva flanko de Petřín. Laŭdire li estis „artisto-kronikisto.“ Oni povas supozi, ke kelkajn desegnaĵojn li faris jam kiel urbano, kiel juna lerta desegnisto. Sed la plej gravaj estas faritaj okaze de lia unua (kaj lasta) vizito, en la j. 1636. Ni jam menciis, ke la grafo Arundel estis ambasadoro de la angla reĝo Charles I koncerne la eventojn, kiuj estas bone konataj el la historio. En Prago li restis 7 tagojn – ĉar li avidis vidi la famegajn art-kolektojn de la imperiestro Rudolfo. Li loĝis en la subburga kvartalo Malnova Urbo. Kaj Václav estis lia favorplena „ĉiĉerono“ tra sia amata naskiĝurbo, kaj eĉ tra la kolektoj en la Burgo (Hradčany).

Certe dum la menciitaj tagoj maturiĝis en li ideo, ke li strebos mezuri siajn art-kapablojn per panoramo de Prago, per la fata defio, kiu surprigas ĉiun artiston, kiu naskiĝis en tiu ĉi fascina urbo, kiu renkontiĝis kun Prago kiel kun granda brilanta vizio, kiun oni povas neniam forviŝi el sia memoro. Václav ekuzis sian nemultan liberan tempon kaj desegnis grandan alrigardon al Prago de Petřín (krom aliaj desegnaĵoj). (Rim.: ĉion li poste prilaboris dum la restado en Amsterdamo).


Kompreneble, ke la plej multajn verkojn li elkreis en Londono.

Londono: en la tempo de Václav Hollar-alveno ĝi estis urbo, kiu havis ankoraŭ mezepokan aspekton kaj karakteron. Ĝi ja ankoraŭ estis „la urbo, kiu inspiris Ŝekspiron“ (+ 1616). (Rim.: komparu la tiaman „barokan Pragon“).

Dankema Hollar memkomprene kiel la unuan objekton de sia verkado kaptis la larĝspacan rezidejon de sia patrono, ĉar la loko al la artisto mem, (ankaŭ al la hodiaŭa spektanto – al tiu nur el la bildoj) efikis per sia hejmeca kaj intimeca ĉarmo. La elrigardo el fenestro prezentis al li loĝdomojn, mastrumdomojn, hejmkapeleton, servistarspacojn, kuirejon, ŝedojn, lignotenejojn, stalojn, forĝejojn, ĉarŝirmejojn, kokinejojn, kolombejon.

Kiom agrable estas vidi jenan patriarhan manieron de tiama vivo. Ankaŭ por la nuntempa vizitanto, kiu eble havas opinion, ke Londono konsistas (= konsistis) nur el palacoj kaj domoj kaj avenuoj (kiuj estis konstruitaj post la granda incendio 1666). Sed por la nacia historio estas pli grave scii, kiel aspektis la Urbo staranta tiam sur la loko pli ol 1 500 jarojn. Kaj pri tio meritas Wenceslaus Hollar, tiam la plej fama Bohemus. En liaj verkoj oni „legas“ poezion, al kiu ĉiu spektanto cedas.

Unu ŝerco tage



Estas nia honoro prezenti al la legantoj novan libron de Michal Lebl kaj Mirka Tomečková.

Ŝercoj kaj gajaj rakontoj ĉiam estis ege popularaj; kiel rakontas al ni la historio – „jam en la antikva Grekio...“ Se ili estus en la libroj, certe tiuj estus multaj „sufiĉe grasaj volumoj“ – trafaj diraĵoj, aforismoj, anekdotoj kaj ŝercoj.

„Unu ŝerco tage“ estus nur malgranda volumo, se ilia kolektanto kaj aŭtoro Michal Lebl ne havus la bonegan ideon pri tri lingvaj variantoj. Kaj se la oportunaj desegnaĵoj de Mirka Tomečková ne pligrandigis ĝian enhavon – amuza, kiel bonaj karikaturoj supozeble

estas. Mi volonte kontribuis mian lingvan provlegadon (la ĉeĥa, Esperanto).

Ni deziras, ke la legantoj multfoje „rid-eksplozas“ – tio estas la sola eksplodo, kiu skuos nian diafragmon kaj ne damaĝos nin, sed plaĉos same al nia korpo kiel al nia animo. Kelkfoje ni trovas la „verajn perlojn“ de la popola literaturo, kiujn ni bezonas ankaŭ en Esperanto.

Margit Turková

Aĉetu en Amazon.com: <https://www.amazon.com/One-Joke-Day-%C5%9Cercos-Tage/dp/B09SP39LFQ>



B U L T E N O
de Esperantista Klubo en Prago
Časopis Klubu esperantistů v Praze
Redaktor: Tomáš Břicháček

Vydavatel:

Klub esperantistů v Praze

pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

IČO 66004322

C/o Jiří Mišurec

Jirečkova 5

170 00 Praha 7